BIBLIOTHÈQUE LA CHAUX-DE-FONDS
LI. SUI

Svisa Esperanto-Societo
Poŝtfako 779
CH-2301 La Chaux-de-Fonds
Tel.: (039) 26 74 07

Januaro 1990

**SVISA ESPERSANTO-SOCIETO
INFORMAS**

## ĜENERALA KUNVENO

**Loko:** Berno

**Dato:** Sabaton, la 17-an de marto 1990

**Kunvenejo:** Hotelo METROPOLE, Salono II, Zeughausgasse 26, 3011 Berno

**Horaro:** 09h00: Malfermo de la salono kaj instalado de la libro-servo kaj de aliaj standoj. Ekspoziciontoj aŭ vendontoj de dokumentoj bonvolu anonci sin skribe aŭ telefone al la prezidanto ĝis la 10-a de marto.

~~10h00: Kafumo kaj interkona babilado~~

**10h30: Malfermo de la Ĝenerala Kunveno**

**Tagordo statuta**

a) Protokolo de la antaŭa Ĝenerala Kunveno aperinta en SER 1989-3 (aprilo).
b) Raporto de la Centra Komitato aperonta en la venonta SES informas.
c) Financa raporto aperonta en la venonta SES informas.
ĉ) Raporto de la kaskontrolantoj.
d) Raporto de la komisionoj.
e) Elekto de membro de la Konflikto-Komisiono por anstataŭi la demisiinton Alfred WENGER. Kaŭzo de lia demisio: maljuniĝo. Ĉiuj aliaj elektitoj daŭrigas sian funkcion.
f) Buĝeto kaj kotizoj por la venonta jaro. La Centra Komitato proponas, ke la kotizoj restu la samaj.
g) Proponoj. (Ne alvenis proponoj ĝis la statuta limdato.)
ĝ) Diversaĵoj.

**12h00 aŭ seeble pli frue: Fermo de la Ĝenerala Kunveno.**

**12h30: Tagmanĝo** (Menuoj anoncotaj en la venonta SES informas).

**14h30-16h00: Varia programo** detaligota en la venonta SES informas.

16h00: Adiaŭa teumo kaj babilado.

16h30: Fermo de la libroservo kaj de la standoj.

**Espero:** Nome de la Centra Komitato salutas la prezidanto, kun la espero, ke multaj SES-anoj ĉeestos la kunvenon.

(Claude GACOND)

-oOo-

## Kial la cirkulero SES-informas ?

Andres Bickel anoncis, ke en marto finiĝos lia redaktora laboro por Svisa Esperanto-Revuo. **Grandegan dankon ni ŝuldas al li pro la enorma helpo, kiun li alportis al nia societo dum iom pli ol 2 jaroj.** Okaze de la lasta kunsido de la Centra Komitato (Berno, 13-an de januaro 90), lin ni demandis pri la tempo dediĉita al SER. La respondo estis, ke almenaŭ kvardeko da laborhoroj estas necesaj por liveri SER-numeron al la presejo. Tio fakte korespondas al ekvivalento de po unu plena labor-semajno monate.

Se oni ne ricevas financan kompenson por tiom temporaba aktiveco, tiam nepre alvenas la momento, kiam ĝin oni devas forlasi. La historio de SES koncerne al la gazeto, titolita unue Svisa Espero kaj nun Svisa Esperanto-Revuo, estas karakterizata de periodoj kun kaj sen gazeto. Kaj ĉiu gazeta renaskiĝo ree alfrontis la samajn problemojn: per limigitaj financaj rimedoj realiĝas efemera miraklo, kiu ĝenerale daŭras du aŭ tri jarojn. Neniu povas oferadi pli longe sian liberan tempon apudprofesian kaj eĉ sian dormtempon. Mi bone konas la situacion, ĉar mi deĵoris kiel lasta redaktoro de Svisa Espero, do ĵus antaŭ ĝia titol-ŝanĝo. Tial, kiam mi akceptis la prezidantecon de SES en 1986, mi klare komprenigis, ke mi ne kumulos la redaktorecon de SER, kiel devis fari mia estimata antaŭulo d-ro Arthur Baur.

Fakte solviĝos tiu problemo, nur kiam SES kapablos salajri la redaktoran laboron. Sed por povi tion fari nia societo devos havi almenaŭ 800 membrojn aŭ posedi tre grandan kapitalon, kies interezoj ebligos pagi kvarontempan aktivecon sufiĉe fakan.

Nia ĉefa celo estu do kreskigi la nombron de la esperantistoj en Svislando kunlabore kun KCE kaj ĉiuj lokaj kaj fakaj societoj, kaj per atentindaj aktivecoj varbi tiujn esperantistojn al SES. Kaj por la nuna periodo ni realisme alfrontu la situacion. Nur ducenton da kotizantoj havas SES. Tial ni trovu provizoran solvon, konservante la ideon je monata apero de SER.

Januaro 90 vidas naskiĝi cirkulero nomata Svisa Esperanto-Societo informas (mallongigo: SES-informas); ĝi alportos novaĵojn, kiujn la societanoj nepre ricevu. Tiu informilo dissendiĝos en koverto, al kiu ni povos aldoni dokumentojn. Tiel senpene lokaj grupoj organizontaj renkontiĝon povos pli facile dissendi sian anoncilon, unuopuloj povos diskonigi komercan varbilon, internaciaj kongresoj povos allogi per detala informilo. Hodiaŭ vi havas la lanĉan numeron de tiu organo senpretenda. Sekvos baldaŭ februara numero pli dika kun raportoj por la ĝenerala kunveno. Jam ricevinte du cirkulerojn antaŭ la koncerna asembleo, vi povos objektive juĝi la situacion la 17-an de marto.

Ni tuj aldonu, ke SER ne mortos. Ni aperigos ĝin neregule forme de temaj numeroj. Kontaktitoj deklaris sin pretaj kunlabori al la redaktado de unu aŭ pluraj kajeroj. Ni ne dubas, ke tiu formulo fine kontentigos vastan publikon. La eksperimentoj, kiujn faris KCE kun la kajeroj de la kolekto Studoj montris, ke ekzistas aĉetantoj por temaj revu-numeroj eĉ tre fakaj. La SES-anoj estos kontentaj ricevi SERon komplemente al SES informas kaj ne-SES-anoj emos aĉeti temajn numerojn por ili interesajn. Tiuj revu-numeroj ebligos kontaktojn kun fakaj medioj favore al nia kaŭzo. Pri ilia aper-ritmo ni nenion promesas. Pli gravos la kvalito de la laboro, ol la reguleco de la aper-ritmo, kiu ankaŭ dependos de la financa situacio de la societo.

Dum la venontaj semajnoj kaj monatoj ni serĉos kunlaborontojn por precizaj taskoj: dissendo de SES informas, rikolto de sciigoj por fakaj rubrikoj: adresaro de la esperanto-organizaĵoj, esperanto-kursoj, okazontaĵoj, ktp. Ni iel garantios la daŭrigon de la laboro, kiun tiel efike plenumis Andres Bickel por SER. Tio estos nia maniero danki al li. Kaj por SER ni serĉos ne nur redaktontojn por temaj numeroj, sed ankaŭ homojn pretajn plenumi tradukojn, stil-reviziadon, grafikan helpon, ktp. Ni esperas, ke la kontaktotoj respondos jese al nia help-alvoko, por la bono de SES kaj por la dinamismigo de la esperanto-vivo en Svislando.

Antaŭdankas nome de la Centra Komitato Claude Gacond, le prezidanto.